

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĉikago

№ 5

Majo, 2018

Karaj legantoj, hodiaŭa nia antaŭparolo estas suffice mallonga: "Agrablan legadon!"

La redakcio

Aprila kunveno de L. KORDYLEWSKI

Nia lasta kunveno, la 25an de aprilo en la Suda Studĉambro je la 6a etaĝo de la Harold Washington Biblioteko en Ĉikago estis sukcesa kaj amuza. Partoprenis ĝin 9 samideanoj. Lasttempe nia grupo signife plijuniĝis. Dum la kunveno 60% estis junaj vizaĝoj. Post jaroj ni ĝuis la reaperon de Darsi, kiu unuafoje venis al nia pikniko antaŭ dek jaroj, raportis pri ĝi en Saluton 07/2008, sed poste tute malaperis de Esperantujo. Ni admiris ŝian fluan lingvokonon kaj aŭdis, ke ŝi doktoriĝas pri limnologio ĉe la Universitato de Ĉikago. Venis ankaŭ alia Hyde-Parkano, Joĉjo, kiun ni varbis pere de Amikumu. Li estas komencanto de Esperanto, kiu ankaŭ parolas Klingonon. Dum nia kunveno li konsekvence rifuzadis krokodili kun ni kaj

ravis nin per sia belega senakĉenta prononcado. La tripersona "Retpaĝa Komitato" raportis pri sia laboro por plibonigi nian retejon

[www.esperanto-](http://www.esperanto-chicago.org)

[chicago.org](http://www.esperanto-chicago.org) kaj diskutis planojn modernigi ĝin. Ni vigle babilis pri multaj temoj, kion ni daŭrigis kiel kutime post la kunveno en la apuda bierejo Brando's Speakeasy. Ni ĝuis resti kune en ĝia eleganta Essanes Room ĝis la malfrua nokto.



Al insulo ne fora, sed malsammora – II de Hanso BECKLIN

La ŝoforo de la aŭto estis la filo de unu el la kongresaj organizantoj; kiam mi alparolis lin en Esperanto, li respondis angle, dirante, ke li ne parolas Esperanton. Malbona aŭguro, mi pensis. Sed li klarigis plu, ke liaj gepatroj disiĝis dum lia junaĝo dank' al pluraj faktoroj, inkluzive la fervorecon de la patro al Esperanto. Ĉar li kreskis en Svislando bruste de sia patrino kalumnianta Esperanton, li neniam lernis la lingvon. Tamen, li ja lernis plurajn aliajn lingvojn... kaj kiel manovri aŭton inter truoj. Ili aperis al mi kiel nuraj flakoj sur malebena asfalta pavimo, sed efektive estis plurajn centimetrojn profundaj kaj, pli grave, pneŭkrevigaj. La movado pli naŭzigis ol lulis nin; sed, eĉ ne veturante sur ŝoseoj je po cent kilometroj hore, ni atingis la kvartalon sufiĉe rapide.

Esplorinte per interreto la kvartalon, kie ni loĝis antaŭ ol vojaĝi, mi sciis, ke ĝi estas vera najbarejo. Malmultaj turistoj decidus gastigi tie, pro la foreco de la vidindaĵoj..., sed al ni, Esperantistoj, la loko estis ideala. Unue, ĉar la impona Esperanto-centro de Havano (vera, kvaretaĝa domo) situis nur kelkcent metrojn for de la gastejoj. Sed due kaj plej grave, ĉar Havano estas etendiĝanta urbego, kaj ni troviĝis en loko sufiĉe proksima al ĉio. Nur nekontentigebla homo plendus pri la organizado brava. La organizantoj aranĝis ĉion: gastejojn, manĝojn, luitajn busojn... kaj, kompreneble, bonan kongreson. Sed mi ne anticipu.

La ŝoforo deponis min kaj Brajenon sur la trotuaron, kaj ni iris sur la peronon por renkonti Ubaldo, nian

gastiganton. Lia domo estis pompa, granda eĉ laŭ usonaj normoj kaj (eksterordinare en sia kvartalo) ĵus farbita. Ni prezentis nin (iom naive) en Esperanto, kaj li iomete gapis, antaŭ ol ni diris la ŝloŝilvorton: "Esperanto". Post tio li volis manpremi kaj vere bonvenigi la atenditajn gastojn... kvankam li mem ne parolis eĉ vorton en Esperanto aŭ en la angla. Konstatinte, ke mia nomo estas la germandevena *Hans*, li decidis, ke estus plej saĝe paroli al ni en la germana (kiun, efektive, kaj mi kaj Brajeno studis antaŭ jaroj).

Li montris al ni la ĉambron dulitan, en kiu ni gastis, en la dua etaĝo. Kiam mi komencis palpi la matracon, li diris pardonpete per sia miksaĵo de la hispana kaj la germana, "Mia alta amiko, mi pardonpetas pro la mallonga lito. Vi ne trovos ĝin komforta, bedaŭrinde. Ĝi estas la plej bona havebla – sciu, ke Kubo estas komunista lando, malkiel Usono."

Ni bone komprenis lin kaj lian sintenon. Li estis unu el la entreprenistoj, kiuj decidis uzi siajn nemoveblaĵojn por enspezi iom da mono en la libera merkato – io, kiun la kuba registaro absolute ne permesis ĝis 1997, t.e. 38 jarojn post la kuba revolucio. Labori ekster la ŝtata kadro povas enspezigi multe pli da mono ol labori en ĝi, sed, kiel diris nia Majstro: "Kiu volas komerci, tiu saĝon bezonas."

Malgraŭ la manko de rimedoj en Kubo, la komercistoj ŝajnis al mi tute saĝaj kaj sagacaj. Ekzemple, multaj el la bantukoj kaj litotukoj en la domo de Ubaldo havis sur sia

dorso etiketon plurlingvan, kiu tute ne altirus mian atenton en alia lando. Sed la graso, majuskla tiparo de la sveda magazeno IKEA aspektis tre neantaŭvidite en lando, kie reklamado estas apenaŭ videbla kaj okcidentaj markoj ĉiam importitaj neoficiale. Oni aŭdis de multaj kubanoj rakontojn pri poŝtelefonoj, komputiloj, vestaĵoj, domgarnaĵoj kaj galanterio kunportitaj de iu parenco el Usono en ties valizo. Sendube ankaŭ multaj el la luksaĵoj en nia gastejo alvenis al Kubo same, flugigita trans la Floridan markolon kelkcent mejlojn, transformita de banalaĵo ĝis furoreco ene de unuhora vojaĝo.

Kvankam neniŭ ero de la vojaĝo postulis multe da tempo, sume pasis preskaŭ 12 horoj ekde mia ekveturo de Milvokio... kaj mi ne tagmanĝis. Terure forte turniĝis mia stomako kvazaŭ dinamo en centralo atendanta karbovagonaron. Energio ne mankis, sed ĉio paneus, se io freŝa ne aperus. Bonŝance, la aliaj Esperantistoj en la domo diris, ke ili piediros al alia domo, kie oni servos al ni la antaŭmenditan vespermanĝon.

La instrukcioj ne estis klaraj, kaj pro nia malfrueta alveno mi kaj Brajeno ne povis kuniri kun la aliaj gastoj al la alia domo por vespermanĝi. Domaĝe. Ni rapide organizis ĉion, dankis Ubaldo kaj atendis lian malŝloson de la pordo. Per ĉarnira grinc' ni komencis nian orientiĝon en lando, kie la biriloj de niaj poŝtelefonoj ne funkciis kaj en kiu ni ne parolis la nacian lingvon. Nur mapo, plastkovrita por ne malkomponiĝi en la humideco, estis en niaj manoj, kaj ne ĉiu strato aperis sur la karto.


Sekvinte la ĉefan straton la 400 metrojn, kiujn priskribis al ni Ubaldo, ni turnis nin por sekvi la flankstraton, kie estu la alia gastejo manĝigonta nin. Sed ni ĝin ne trovis facile... ĝis tiam, kiam ni petis helpon de iu klinanta el sia klapkovrebla manĝiĉeto. Lin ne konsternis nia manko de vortoj... ni simple diris: "*Casa particular*" kaj li tuj komprenis, ke ni estis inter la gregoj celanta la gastejon trans la straton de lia ĝiĉeto.

Finfine ni sonorigis ĉe la pordo de la (frape linda) domo, kie ili atendis nin kaj kondukis nin al ĝardeneto, kie la torento de nekonataj vortoj sur la stratoj finfine sekvis kurson kompreneblan al ni, Esperanton. La kelnero sidigis nin ĉe tablo kun du italoj, unu konata usonano kaj unu japano. Finfine ni atingis Esperantujon... (*daŭrigota*)

José MARTÍ (1853-1895)

Fama kuba politikisto, ĵurnalisto, filozofo, poeto, verkisto kaj Nacia heroo. Li batalis pro la sendependeco de sia patrujo.

Martí komencis jam tre juna batali por la sendependeco de Kubo disde hispana dominado. Li ekziliĝis kaj studis en Hispanio, kaj ankaŭ tie propagandis kontraŭ la malbonaj agadoj de la tiama hispana registaro. Li poste loĝis en Francio kaj diversaj landoj de Sudameriko. Li muntis sian bazon en Usono, sed samtempe oponiĝis al ajna partopreno de la usona registaro en la milito, timante la enmiksiĝon de tiu lando en la posta historio de la insulo. Li mortis dum la sendependiga batalo kontraŭ la hispana armeo. La internacia flughaveno de Havano estas nomata laŭ li.



Poemo de J. Martí "La Blanka Rozo" (Cultivo una Rosa Blanca):

<p>Mi kultivas blankan rozon En julio kiel en januaro Por la sincera amiko Kiu donas al mi malkaŝeman manon Kaj por la kruela homo kiu elŝiras la koron, per kiu mi vivas, Nek urtikojn nek dornojn mi kultivas; Mi kultivas la blankan rozon.</p>	<p>Cultivo una rosa blanca en junio como enero para el amigo sincero que me da su mano franca Y para el cruel que me arranca el corazón con que vivo, cardo ni ortiga cultivo; cultivo la rosa blanca.</p>
--	--

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Eric Killian
Vicprezidanto – Randy Ream
Ekspredizanto – D-ro Les Kordylewski
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Charles Gunn
Direktoroj – Viktor Payuk, Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare
Familia membro: \$30
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos en la parko apud **Montrose Beach**, 601 W Montrose Ave

17-an de Junio – tradicia E-pikniko, inter mateno kaj la 4-a ptm

24-an de Julio – temo estos anoncata

28-an de Aŭgusto – pri UK en Lisbono raportos Hanso B.

Esperanto-kastelo Greziljono

2018-julio-09/27 Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

2018-julio-09/16 [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj feroj kaj Esperanto-kurso

2018-julio-15/21 [Semajno de ĉiĉeronado](#) en Anĵuo kun *Catherine Kremer*

2018-julio-16/21 [Speciala semajno](#) kun kursoj de Esperanto

2018-julio-21/27 30-a [Internacia E-Konferenco](#) de OSIEK « Esperanto en Artoj »

2018-aŭgusto-11/19 8-a [Festa Semajno](#) por infanoj kaj familioj

Aliĝu frue por ĝui redukton, klaku: <http://gresillon.org/somero>